



SERVU SINDONE!

**Karaj geamikoj en Rotary kaj Esperanto,
la plej granda parte de niaj membroj
agadas en siaj lokaj kluboj de Rotary
kaj de la Esperanto movado
dise en la plej diversaj landoj de la mondo.**

**La laborkondiĉoj en la du organizaĵoj
diferencas, ĉar dum en Rotary la membroj
volontulas pri humanitaraj kaj edukaj projektoj inter
popolkomunumoj en malfacilaj vivkondiĉoj,
la Esperanto Movado aktivas prioritare pri la solvo de la
internacia komunikado per la uzo de neŭtrala lingvo.**

Sed kio kunligas ambaŭ movadojn estas la sincera deziro
agadi kaj labori por pli justa mondo kaj nuligo de diskriminacioj.
Estas la deziro de la Estraro de RADE ke la du movadoj kunlaboru pli intense, ĉar ne estas
novaĵo ke *Unuiĝo estas forto!*
Pro tio nia prezidanto Joseph Van der Vleugel proponos en la Universala Kongreso de UEA 2013
en Rejkjavik krei novtipan klubon, elektronikan Rotarian Klubon, kiu funkcias en la reto kaj tiel
permesas al homoj ligitaj al la du movadoj interkomunikiĝi per komuna lingvo.
Pri tiu propono de nia prezidanto Josefo ni atendas la opiniojn de la RADE membroj tre baldaŭ,
antaŭ la UK 2013 en Rejkjavik.
Nia prezidanto Josefo Van der Vleugel prelegis antaŭ nelonge en la Esperanto-klubo de
Oostende pri la ideo starigi e-klubon en ROTARY por vastigi la kunlaboron inter la du movadoj.

Ooo



La Rotaria Mondkonferenco 2013 okazos en Eŭropo, en Lisbono, ĉefurbo
de Portugalio, kaj ĉiuj atendas grandnombrian partoprenon de eŭropaj
rotarianoj, ĉar pasintjare en Bangkok la partopreno limiĝis al nur 16 mil
kongresanoj, dum en junio estas atendata la partopreno de multaj eŭropanoj
kaj brazilanoj, kiuj ja povos profiti la fakton ke la portugala lingvo de Brazilo kaj
de Portugalio estas preskaŭ samaj.
Bedaŭrinde nur preskaŭ....

Ĉe la stando en Lisbono ni bezonas pliajn deĵorantojn. Ĉu vi ne emas, rigardante la suprajn fotojn, partopreni tiun simpatian kunestadon inter rotariaj samideanoj sen lingva problemo, kiuj uzas la ŝancon de tutmonda rotaria konferenco por disvastigi nian Lingvon?

oooooooooooooooooooooooooooo

Leandro Freitas, membro de nia Estraro kaj aktiva rotaraktano En Brazilo, partoprenas nuntempe kurson en esperanto pri Interlingvistikaj studoj en la pola universitato Adam Mickiewicz en Poznan. Certe la rotaria movado profitos pro tiu lingve altnivela membro.

oooooooooooooooooooooooooooo



Kaj pripensante iomete nian komunan lingvon, bonvolu konsideri ke esperanto estas la absolute plej elstara komunikada invento de ĉiuj tempoj. Estas inteligenta unika idiomo kiu elvokas la plej universalajn sentojn. Nur esperanto povas doni la liberecon al ĉiu individuo en la mondo sin esprimi sen limoj, venkante la plej grandan defion de la homo specio.

Multlingvismo kaj tradukoj ĉiam restas paliativoj, kies senefikeco estas evidenta en la proporcio en kiu novaj teknologioj en la kampo de komunikado kaj transportoj plifaciligos rektan interŝanĝon inter la popoloj.

oo

- RADE ĝuas notindan prestiĝon en RI, kiel unua rotaria amikaro (1928), sed tiu prestiĝo ne estas proporcia al la malgranda nombro de niaj membroj.

Ĉar nia Amikaro ne nur akceptas parolantajn esperantistojn rotarianojn, sed ankaŭ simpatiantajn rotarianojn, ni invitas niajn membrojn aligi al RADE siajn familianojn kaj ankaŭ siajn geamikojn rotarianojn, kiuj simpatias al Esperanto.

La aliĝo, kiel oni scias, estas **senpaga!**

Ret-adreso por aliĝi kaj ricevi la aliĝilon:

< bonaespero.brasil@gmail.com >

(kaj aldone sube)

Sekvas la retadreso de la RADE Estraro:

1. Eskil Svane - Svislando - [Eskil Svane <svane.pouzasco@gmail.com>](mailto:svane.pouzasco@gmail.com)
2. Marc Levin – Francio - marc.levin@orange.fr
3. Joseph Van der Vleugel - Belgio joseph.vandervleugel@skynet.be
4. Sherry Wells – Usono – esperantosherry@tm.net
5. Sasa Pilipovic – Serbio - Sasa Pilipovic sapy@eunet.rs
6. Paul Desailly – Aŭstralio – pauldesailly@yahoo.com
7. Leandro Freitas – Brazil – freitas.lettras@gmail.com
8. Giuseppe Grattapaglia – Brazilo - bonaespero.brasil@gmail.com

Retejo < radesperanto.org >



**ROTARY INTERNATIONAL
R.A.D.E.**

Rotaria Amikaro de Esperanto

- Honora Prezidanto Eskil Svane – Svislando – pouzasco@gmail.com
 Honora Prezidanto Marc Levin - Francio - marc.j.levin@orange.fr-
 Prezidanto Joseph Van der Vleugel – Belgio-joseph.vandervleugel@skynet.be
 Sekretario Giuseppe Grattapaglia – Brazilo - bonaespero.brasil@gmail.com
 Estrarano Sasa Pilipovic – Serbio – sapy@eunet.rs
 Estrarano Sherry Wells – Usono – esperantosherry@tm.net
 Estrarano Paulo Desailly – Australio – pdesailly@myway.com
 Estrarano por Rotarakto Leandro Freitas – Brazilo – freitas_letras@yahoo.com.br

La Estraro de ROTARY INTERNATIONAL stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri profesiaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de R.I.

La grupo RADE, konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la internacian lingvon Esperanto, celas realigi la idealojn de ROTARY INTERNATIONAL por la Interkompreno, la Amikeco kaj la Paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter Rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de R.I.

Membriĝu senkoste en nia amikaro, se vi apogas niajn celojn,
 kiuj kongruas perfekte kun la kvar etikaj principoj de Rotary!
Se vi apogas tiujn ideojn, partoprenu en nia grupo!

1. Nomo
2. Rotaria Klubo kaj Distrikto
3. Urbo kaj Lando
4. Adreso
5. Telefono kaj retpoŝto
6. Profesio.....
7. Respondecoj en Rotary
8. Esperanto parolanto ek de kiam9. Rotariano ek de kiam
9. Parolataj lingvoj.....
10. Laŭvolaj pliaj informoj.....
11. Dato kaj subskribo

